


Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Historio Jokohama



Eroŝenko en Jokohamo 1916, laŭ taglibro de Torii Tokujiroo

kompilis Sibayama Zyun'iti

Enkonduko

La ĉi tie prezentata verko estas eltiraĵo tradukita el la disertacio de s-ro Kisi Hiromi, kun lia komento kaj eltiraĵo el la brajla taglibro de Torii Tokujiroo, siatempa amiko-blindulo de Vasilij Eroŝenko. Tiutempe Eroŝenko estis 26-jara, kaj Torii 21-jara. La parolo de Eroŝenko en tiu ĉi taglibro fakte estis titolita “Nova Spirito en la mondo”, kaj legebla en la 4-a volumo de la serio pri Eroŝenko kompilita de s-ro Mine Yositaka.

Por publikigi tiun ĉi esperantigon, ni petis permeson de s-ro Kisi, docento de Blindula Lernejo de la gubernio Kioto, kaj akceptita. La aŭtorrajta posedanto de s-ro Torii estas Blindula Lernejo de la gubernio Kioto.

Eltiro el skribo pri Eroŝenko, el la Brajla Taglibro de Torii Tokujiroo, konservita de Torii Ito, la edzino

redaktita de Kisi Hiromi
(docento de Blindula Lernejo de la gubernio Kioto)

Abstrakto de tiu ĉi tezo

Torii Tokujiroo renkontis Vasilij Eroŝenkon en 1914 en la Tokia Blindula Lernejo, lernis Esperanton, kaj poste fariĝis unu el la reprezentantoj de la japana blindularo. Ili estis tiel familiaraj inter si, ke Torii vokis “Ero-san” (Eroĉjo) kaj Eroŝenko vokis “Boĉĉan” (Knaĉjo), kaj la simpatia sento de Torii al Eroŝenko ne ŝanĝiĝis ĝis la morto de Torii.

La eltirita taglibro de Torii estas por marto en 1916.

Torii kaj Eroŝenko en 1916

Sukceso en Jokohama Esperantujo kaj eksciteco

Mi (=Kisi) komparu la taglibron pri la 11a de marto de Akita Uĵaku kaj la taglibron de Torii. En tiu tago, Eroŝenko, Uĵaku, Torii partoprenis en Esperanto-propaganda parolado en Jokohamo.

Akita Uĵaku tre koncize priskribas

“Leviĝis je la 10a matene. Hodiaŭ Esperanto-kongreso en Jokohamo. Vizitis Eroŝenkon je la 1a kaj duono. Kun Torii, Iba kaj aliaj vizitis Jokohamon. Trajno kuris sur neĝkampo. S-ino Alexander vive parolis kiel kutime. D-ro Nakamura Kijoo, d-ro Kuroita Kacumi, s-roj Takusari, du estimataj Takahaŝioj, kaj aliaj 7 aŭ 8 personoj. Atingis Jokohamon je la 4a. Oni regalis nin en restoracio. Salutis Nakamura kaj Kuroita. Mi parolis kun la temo ‘Literaturo kaj internacieco’. Ĉiuj aŭskultis silente kaj komforte. Tre sukcesa kunveno. Tokio je la 12a. Enlitiĝis je la 3a.”

Kompare al tio ĉi, elokventas Torii. Kiel skribite, li estis ekzaltita de la unua uzo de tranĉilo kaj forko kaj frando de okcidentostilaj manĝaĵoj, kaj de la debuto en Esperantujo.

Jen el Torii

[noto: kursivaj vortoj estas Esperantaj en la originalo]

En neĝo mi atingis Stacion Ŝinbaŝi per tramo, mi vidis grupon da antaŭvenintoj, kiuj ĉirkaŭ hejtilo parolas “*tre ĝoja vidi vin!*” ktp tie kaj ĉi tie. Mi sen

kutima timida sento komforte entrajniĝis kun s-roj Akita, inter la grupanoj de la doktoroj Nakamura, Kuroita kaj aliaj, gaje cele al Sakuragiĉoo. En la vagono, f-ino Alexander diris “*mi volas la vizaĝon eksteren*”, kaj viŝis randon de vitra fenestro.

Post la kvara ni atingis Jokohamon, kaj akceptis bonvenigon de jokohamanoj, veturis rikiŝe 12-ope al la Restoracio Nisseiken, kaj eniris invitite en duaetaĝan ĉambron. Poste ni estis gviditaj al la restoracia ĉambro, kaj mi kaj Eroŝenko sidiĝis kun s-ro Asai en la mezo. Estis 3 aŭ 4 ĵurnalistoj. Mi unuafoje en la vivo spertis sidiĝi antaŭ tia ĉi tablo, kaj alprenis forkon kaj tranĉilon. Ĉio iris glate laŭ la helpo de s-ro Asai, kaj je la deserto, reprezentanto de jokohama esperantujo parolis bonvenige, tre simple, “Ni bonvenigas alvenon de *verdaj steloj* de Tokia ĉielo”. D-ro Nakamura same simple responde salutis nome de Japana Esperantista Asocio, kaj sekvis aliaj du-tri paroloj ĉetablaj, kaj ni eliris de tie je la 6a.

Ni iris en la atendoĉambron de la Elementa Lernejo Jokohama, proksime, kaj post paŭzo, je la duono post la 6a, ĉiuj iris en la aŭditorion en la 2a etaĝo kun verda stelo surbruste. S-ino Alexander prelegis “*Kion diris Abudl Baha pri Esperanto?*”, s-ro Akita pri “Internacieco de literaturo kaj Esperanto”, Eroŝenko pri “*Nova Spirito*” --- Tiuj estis la plej aŭskultindaj. La unuan parton finis ludado de “naturo kaj vivo” de Eroŝenko en solo, kaj en la fino estis mia solkanto “*preĝo sub la verda standardo*” de Zamenhof, kaj la fermo. Jen la 10a kaj duono. Mi ja fariĝis kompetenta esperantisto --- mi sentis min iom stranga. Mi eĉ mise kantis, sed japanoj ne komprenis tion kaj en aplaŭdo mi malsupreniris de la podio. [...]

Mi venis hejmen je la unua kaj duono, sed ne povis endormiĝi ĝis la 3a.

Mi ricevis ĉi-matene poŝtkarton de la amikino.

Komento de Kiŝi

Ne estas multo por suplementi, sed la priskribo konforma al tiu en la Taglibro de Uĵaku, aŭ pli da detalo ol de Uĵaku montras la valoron de la brajla taglibro, kun graveco kiel nova studomaterialo.

Cetere mi sentas min ridetanta, legante priskribon kiel “Mi ja fariĝis kompetenta esperantisto --- tiel pensinte mi sentis min iom stranga.” La “amikino” en la fino temas pri Ito, kun kiu Torii edziĝis du monatojn poste en majo. En tiujara julio, Eroŝenko ekvojaĝis al Siamo.

Postnotoj de Sibayama

(1) Je la 11a de marto 1916, la Jokohama Filio de Japana Esperantista Asocio (JEA) okazigis propagandan prelegserion en la aŭditorio de la Elementa Lernejo Jokohama, post bankedo. Nakamura Kijoo, Kuroita Kacumi, Ĉif Toŝio, Eroŝenko, Akitaj Uĵaku k.a. partoprenis, kaj estis 300 aŭskultintoj. (laŭ “Dokumentoj pri Japana Esperanto-Movado en 1906-1926”).

(2) Ĉi tie, la restoracio estas notita kiel “Nisseiken”, sed laŭ esploro de tiama restoracia situacio, devas esti “Nisseirou”. Se tiel estas, vidu la foton!



Socio Jokohama

La lasta broŝuro pri la viktimoj pro falo de ĉas-jeto de la usona armeo

Doi Ĉieko

En 1977 falis ĉas-jeto de la usona armeo sur loĝkvartalon en norda parto de Jokohamo. Pro tio mortis patrino kun du infanoj, kaj vundiĝis ses loĝantoj. Poste fondiĝis loka civitana grupo pri la akcidento kaj eldonadis broŝurojn, sed pro forpaso de jaroj membroj de la grupo pli kaj pli maljuniĝis kaj ĝi devis redukti la agadon. S-ro Saitoo Masahiro, unu el ĉefaj membroj de la grupo eldonis la lastan broŝuron en kiu aperis kronologia tabelo pri la akcidento.

La akcidento

Ĝi okazis la 27an de septembro en 1977. Ĉar s-ro Saitoo loĝis iom proksime de la loko, li iris tien en la sekva tago. Tiam ankoraŭ fumo kaj vaporo levigis de la loko. Troviĝis ankaŭ usonaj soldatoj, kiuj esploris la aferon.

S-ro Saitoo siatempe estis nur unu el observantoj scivolemaj, sed li, kiel reala rigardanto de la afero, havis ĉiam pli da simpatio al la viktimoj kaj parolis al lokaj geknaboj pri la akcidento. Li tiel komencis subteni la viktimojn.

Fondiĝis grupo

Naŭ jarojn post la akcidento li kun aliaj agantoj fondis la grupon “Porpaca Centro de la Materialoj de la Akcidento pro Falo de la ĉas-jeto de la Usona Armeo”. Kolektinte fotojn kaj aliajn materialojn, la grupo eldonis broŝuron kun ĉ. 40 paĝoj, kaj sendis ĝin al lernejoj kaj bibliotekoj. Ĝis nun la grupo eldonis ĉ. 10 numerojn. Ĉiu numero havis apartan temon: en 2011 “Poemoj omaĝe al la viktimoj” verkitaj de civitanoj kaj poetoj; en 2012 drama scenaro “Ĉu vi nun aŭdas la kanton de Kolomboj Rukulantaj” ktp.

La grupo agadis jam 30 jarojn post la fondiĝo, sed ĝiaj membroj maljuniĝis, kaj nun s-ro Saitoo sola preparas eldoni lastan flugfolion pri la aktivado.

La lasta broŝuro

Ĝi enhavas tre detalan kronologian tabelon en 61 paĝoj. Ĝi estis eldonita en la 26a de januaro ĉi-jare, ĉar la patrino mortis en tiu tago antaŭ 34 jaroj post fizika kaj psika suferado dum 4 jaroj kaj 4 monatoj.

En la gvidlibro Esperanta

En “Gvidlibro pri Jokohamo, havenurbo nova kaj malnova – kaj – Kamakura, ĉefurbo antikva”, eldonita en Esperanto en 2005, troviĝas la artikolo pri “Statuo de Patrino kaj Infanoj”, kiu staras en “Monteta Parko Fronte al la Haveno”. En ĝi skribita estas jena teksto:

“Statuo de Patrino kaj Infanoj

En 1977 ĉasjeto de usona armeo kraŝis sur loĝkvartalo en Jokohamo. Pro la tragika akcidento mortis du infanoj kaj la patrino, kaj krome vundiĝis kelkaj urbanoj. Oni konstruis la statuon “Patrino kaj Infanoj” dank’ al ofero de la patro de la pereigita patrino. La statuo staras en “Monteta Parko Fronte al la Haveno”.

Pli detale pri la statuo

La du infanoj tri-jara kaj unu-jara estis savitaj, sed

matene de la sekva tago ili mortis. Ili deziregis trinki akvon, sed kuracistoj ne permesis tion pro tio, ke trinkado de akvo tuj povus konduki ilin al la morto.

La patrino havis brulvundojn sur 80 procentoj de la tuta haŭto kaj kondukita al alia hospitalo. Pro multfoja haŭto-grefto daŭris danĝera stato, sed unu jaron poste ŝia stato iom pliboniĝis. Estis mirakle. Post ioma pliboniĝo de la sano fizika kaj mensa, ŝi estis informita pri la morto de la du infanoj. Ŝi dolore ĝemadis sed sin kuraĝigis por vivi plu omaĝe al la forpasintaj infanoj. Kvar jarojn poste ŝi estis devigita transiri al alia hospitalo por mensa kuracado, sed tuj poste mortis pro malfacila spirado.

Ŝia patro decidis instalii statuon de siaj filino kaj nepoj en iu publika loko. Danke al multaj fervoraj helpoj la statuo estis instalita en “Monteta Parko Fronte al la Haveno” en 1985, sed meti ian monumenton kun teksto estis ne permesite. Post tio daŭris movado por la monumento, kaj 21 jarojn poste en 2006 finfine estis permesite starigi monumenton ĉe la statuo, kun la teksto: “Amstatuo de Patrino kaj Infanoj. En la 27a de septembro 1977, ĉas-jeto de la usona armeo falis sur la urbeton Eda en la kvartalo Midori (nun la urbeto Eda-kita en la kvartalo Aoba). Pro tio mortis tri urbanoj (patrino kaj du infanetoj). Ĉar la infanetoj deziris iam rigardi maron, ni starigis la amstatuon en ĉi tiu parko, danke al monoferoj.”



Poemo Esperanta

Rilate al “Poemoj omaĝe al la viktimoj”, mi iom skribu. En ĝi famaj kaj nekonataj poetoj, aktor(in)oj, kantist(in)oj kaj parencoj de la viktimoj skribas poemojn, kantojn, hajkojn kaj utaojn. En la libro mi trovis du poemojn de s-ino Noda Ĵunko, kantistino konata en Esperantujo. La titoloj estas “1582 tagoj – de tiu tago en septembro” kaj “Mil Paperaj Gruoj”, kiu lasta estas tradukita de s-ro Konisi Gaku en Esperanton, kvankam mi ankoraŭ ne trovis la esperantigitan tekston.

Eseo

malgranda aventuro

SIBAYAMA Noriko

Kiam mi estis 5-jara knabino mi vizitadis infanĝardenon, kiu okupis parton de elementa lernejo kaj situis piede 20 minutojn for de mia domo. Mi estis tute muta eksterdome. Komence mi tute ne interesiĝis pri ludo aŭ kanto en la infanĝardeno. Sed iom post iom mi povis movi la korpon dum leciono kaj ĝui kantadon nur per aŭskultado.

Iun tagon multaj gepatroj vizitis vidi lecionon. Inter la gepatroj kompreneble miaj gepatroj troviĝis. Reveninte hejmen mia patrino demandis, "Pri kio vi parolis kun via najbara knabo?" "Pri nenio mi parolis." "Sed vi movis buŝon rigardante la vizaĝon de la knabo." "Aha, tiam mi sentis jukon je mia nazo, kaj movis buŝon." Post tiu ĉi konversacio, mia patrino eksplodis per rido. Tiam miaj gepatroj ambaŭ laŭdis mian pentraĵon sur la muro de infanĝardeno, dirante, "Via pentraĵo estis plej bona sur la muro. Ni bone komprenis ke vi pentris knabinon."

Mi surpriziĝis aŭdinte tion, ĉar la pentraĵo estis por mi fuŝaĵo. Vere mi pentris knabinon sed mi ne havis memfidon, ke aliulo povas diveni ĝin knabino.

Post tiam mi ŝatis desegnadon kaj pentradon.

Iun tagon post leciono, najbare sidanta knabo Joĉjo diris al mi, "Hodiaŭ ni reiru hejmen sur alia vojo." Mi ne povis nei, kaj kune kun li eliris el

malantaŭa pordo de la lernejo. Ĝis tiam mi neniam iris al la malantaŭa pordo. Do antaŭ mi etendiĝis tute nekonata pejzaĝo. Joĉjo diris, "Mi opinias, ke via domo estas en tiu direkto," kaj ekiris. Mi sekvis lin, ĉar mi mem havis neniom da opinio. Ĉu dek, dudek, tridek minutojn ni piediris? Neniam ni atingis mian domon. Mi tute perdis la direkton. Kredeble Joĉjo ne sciis mian domon. Mi demandis, "Ĉu vi povas reiri al VIA domo?" "Jes, mi povas." Kaj ni kune celis al lia domo. Ni atingis lian domon. Li eniris en sian domon, kaj lia patrino surpriziĝis vidinte min, kaj demandis Joĉjon, "Kio okazis?" Aŭskultinte lian klarigon ŝi demandis min, "Ĉu vi povas reiri hejmen de la lernejo?" Mi jesis, kaj ŝi kondukis min al la lernejo. De tie mi celis mian domon tra kutima pordo. Survoje al mia domo renkonte venis patrino kaj knabino (pli aĝa ol mi). Ili flustre parolis, "Kial infanĝardejano revenas tiel malfrue?" "Demandu rekte." Kaj la knabino demandis min, "Kial tiel malfrue vi revenas?" Mi respondis, "Mi perdis vojon." La knabino sciigis mian respondon al la patrino.

Reveninte hejmen, mi eksciis, ke mia patrino kaj mia instruistino kaj eĉ lernejestro ege maltrankviliĝis. Mia patrino diris, "Post nelonge ni informus policon." Mi mem ne sentis tion tiel grava. Nun mi povas supozi kiel grandan maltrankvilon tiam mi donis al mia patrino.



TIEL OKAZIS

Hama-Ronda Vespero en februaro

feb. 20, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

temo: **Slovakio, lando de la 101-a Universala Kongreso, kaj Nitro, la kongresa urbo**

Unue Sibayama Zyun'iti prezentis la Kongreson mem, kaj Doi Ĉieko resumis la longan tradicion de Esperanto-movado en Slovakio. Fine Doi Hirokaz prezentis la landon per la materialoj, donacitaj aŭ pruntitaj de la Slovaka Ambasadorejo en Japanio.

NIAJ PLANOJ

Hama-Ronda Vespero en marto

mar. 19, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

temo: **Polenoj sub tero rakontas**

prelegonto: Kijonaga Ĵoota

Nia membro, laboranta en urboplanada sekcio de Tokio, rakontos pri biologia-arkeologia faceto de mikroorganismo "poleno".

1. Plantoj kaj homaro
2. Esplori historion de arbaro
3. Kio estas polen-analizo?
4. Por altigi precizecon de la analizo